# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Julio : 1 2022


## SUPERA KORTUMO DE OHIO, EN USONO, MALPERMESAS ABORTIGI PERFORTITAN 10-JARAĜAN INFANINON

Fine de la monato junio, ekvalidiĝis leĝo en la usona ŝtato Ohio, laŭ kiu, estas malpermesite kaŭzi aborton se la virino estas graveda de 6 semajnoj. Post tiu momento oni konsideras, ke la koro de la feto ekbatas.

Tiel, jura instanco de tiu ŝtato malpermesis abortigi 10-jaraĝan infaninon, kiu estis sekse perfortita. La kuracisto taksis, ke ŝia gravedo jam atingis ses semajnojn kaj tri tagojn, do, tiu aborto estus kontraŭ-leĝa en Ohio, eĉ se konsideri la specialajn trajtojn de tiu kazo.

La leĝo antaŭe jam estis apelaciita, tamen la Supera Kortumo de Ohio juĝis, ke oni ne povas nuligi la tutan leĝon ĝis la pristudo de ĉiuj apelacioj.

Ĉi tiu afero okazas post la ĵusa decido de la Usona Supera Kortumo, laŭ kiu, aborto ne estas rajto konstitucie agnoskita. Do, ĉiu usona ŝtato rajtas decidi pri tiu afero laŭ siaj propraj leĝoj. Tiel, povas kunekzisti kompleta malpermeso en ŝtato kaj tuta akcepto en alia apuda.



’ Supera Kortumo de la usona ŝtato Ohio en Columbus

Kaj se paroli pri tiu 10-jaraĝa infanino, ŝiaj familianoj translokis ŝin en la apudan ŝtaton Indianon, tie tiu aborto ne estas kontraŭ-leĝa. Tamen, en Indiano oni decidas nun restrikti la efektivigon de abortoj, sed debatoj pri ĉi tiu temo okazos en la ŝtata parlamento fine de la monato julio. Ĝis tiam, aborto de gravedulino de 6 semajoj ne estas kontraŭ-leĝa.

Laŭ deklaroj de la aŭtoritatuloj de Indiano, ili vidas kreskadon de la kvanto da virinoj kiuj eniras en hospitalojn de tiu ŝtato por abortigaj operacioj, ĉar en siaj propraj ŝtatoj jam ekvalidiĝis novaj restriktaj leĝoj.

# *Vorto de la Semajno*

**Atesti:** Antaŭ tribunalo konfirmi aŭ malkonfirmi aserton aŭ fakton kiel vidinto aŭ aŭdinto.

**Atesto**: Ago, vortoj aŭ skriboj de iu, kiu atestas.

**Atestanto:** Persono, kiu, vidinte aŭ aŭdinte okazaĵon, povas atesti pri ĝi.

**Atestaĵo:** Tuto de la atestoj en proceso.

**Atestigi:** Alvoki iun kiel atestanton



Dum la proceso, la atestanto devas promesi aŭ ĵuri, ke li nur diros veron.

La Universala Kongreso de Esperanto okazos en Montrealo (Kanado) de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto. Verŝajne, dum ĝi okazos renkontiĝo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio. Se vi estas membro de IJEA kaj vi planas ĉeesti la UK-on, bv. antaŭ-informi pri via preteco ĉeesti la renkontiĝon.

jurista@esperanto.ac